# KONKLAVOJ 2025

## LA KARDINALOJ

La Kardinala Kolegio konsistas el 252 kardinaloj.

La kardinaloj-elektantoj kiuj partoprenas la konklavon estas ĉiuj en la aĝo malpli ol 80 jaroj.

La prezento de la konsisto de la Kardinala Kolegio kun la indiko dum kies pontifikado ili estis kreiitaj kaj ĉu ili estas la elektantoj aŭ ne:

| Papo | Johano Paŭlo la 2-a | Benedikto la 16-a | Francisko |
|---|---|---|---|
| elektantoj | 5 | 22 | 108 |
| neelektantoj | 36 | 40 | 41 |
| sume | 41 | 62 | 149 |

La plej aĝa membro de la Kardinala Kolegio estas la kardinalo *Angelo Acerbi* (naskita la 23-an de septembro 1925).

La plej aĝa estas la kardinalo-elektanto *Carlos Osoro Sierra* (naskita la 16-an de majo 1945). La kardinalo *Mykola Bychok*, C.SS.R. (naskita la 13-an de februaro 1980) estas la plej juna kardinalo.

La kardinaloj-elektantoj laŭ la aĝo (*aĝo - nombro*):

**79 j.** - 10(-1)*; **78j.** - 7(-1)*; **77 j.** - 13; **76 j.** - 9; **75 j.** - 11; **74 j.** - 11; **73 j.** - 3; **72 j.** - 6; **71 j.** - 3; **70 j.** - 3; **69 j.** - 5; **68 j.** - 3; **67 j.** - 6; **66 j.** - 6; **65 j.** - 4; **64 j.** - 5; **63 j.** - 3; **62 j.** - 3; **61 j.** -7; **60 j.** - 3; **59 j.** - 5; **57 j.** - 4; **56 j.** - 1; **54 j.** - 1; **53 j.** - 1; **52 j.** - 1; **51 j.** - 2; **50 j.** - 1; **45 j.** - 1.

**Du kardinaloj ne partoprenos la konklavon*.

Inter la kardinaloj-elektantoj estas 33 kiuj apartenas al diversaj 17 religiaj familioj:

**franciskanoj (O.F.M.)** - 5, **salesianoj (S.D.B.)** - 5, **jezuitoj (S.I.)** - 4, **franciskanoj konventualoj (O.F.M.Conv.)** - 3, **dominikanoj (O.P.)** - 2, **vincentanoj (C.M.)** - 2, **redemptoristoj (C.SS.R.)** - 2, **verbitoj (S.V.D.)** - 2 kaj po 1 **aŭgustenano (O.S.A.), cistercano ( O.Cist.), kapuceno (O.F.M.Cap.), konsolata misiisto (I.M.C.), misiisto de la Sankta Koro de Jesuo (M.S.C.), senŝua karmelano (O.C.D.)**, **Sekulara Instituto Pio X**, **skalabriniano (C.S.), spirituano (C.S.Sp.).**

**23 kardinaloj-elektantoj laboras en la Roma Kurio.**

| AFRIKO | AZIO | EŬROPO | NORDA AMERIKO (KANADO KAJ USONO) | CENTRA AMERIKO | LATINAMERIKO | OCEANIO |
|---|---|---|---|---|---|---|
| **18 (-1)*** | **23** | **53 (-1)*** | **14** | **6** | **17** | **4** |
| **13%** | **17%** | **39%** | **11%** | **3%** | **14%** | **3%** |

**du forestas*

Plej multe da kardinaloj-elektantoj devenas de Italio (17), Usono (10), Brazilo (7), Francio (5), Hispanio (5).

Por pliaj konsultoj, i.a. por vidi biografiojn de la kardinaloj, bv. viziti la oficialan retejo de la Sankta Seĝo:

https://press.vatican.va/content/salastampa/it/documentation/card_bio_typed.html

## ĜENERALAJ KUNVENOJ

Post la morto (aŭ la demisio) de la Papo komenciĝas la periodo de *Sede vacante* (Vaka seĝo). La plejparto de la kardinaloj de la Roma Kurio demisias, inkluzive de la Kardinalo Ŝtatsekretario. Dum tiu periodo, en siaj postenoj restas: la estro de la papaj liturgiaj solenoj, la supera penitenciero (estro de la Apostola Pentoficejo), la papa almozdonanto, la kardinalo kamerlingo, la dekano de la Kardinala Kolegio, la kardinalo vikario por Romo, la vicregento, la ĉefpastro de la Baziliko de Sankta Petro, kaj en la Ŝtatsekretariejo - la vicestro por ĝeneralaj aferoj, la sekretario por rilatoj kun ŝtatoj kaj internaciaj organizaĵoj, kiel ankaŭ la sekretarioj de la dikasterioj de la Roma Kurio, por daŭrigi administrajn taskojn.

Dum tiu periodo, la kardinalo kamerlingo provizore estras kaj respondecas pri la administrado de la Eklezio ĝis la elekto de nova papo.

La kardinaloj kolektiĝas en Vatikano por la *Ĝeneralaj Kunvenoj* (*congregationes generales*), kiuj celas:

- ebligi pli bonan konatiĝon inter kardinaloj, precipe tiuj nomumitaj dum malsamaj konsistorioj (kaj sub diversaj Pontifikoj);
- pridiskuti la staton de la Eklezio el kaj organiza kaj paŝtista vidpunktoj: prioritatoj, defioj, urĝaj bezonoj;
- pripensi la profilon kaj kvalitojn de la nova Papo;
- decidi pri diversaj organizaj demandoj, inkluzive de la komenco de la konklavo;
- spirite prepariĝi por la konklavo.

## KIEL ONI ELEKTAS LA PAPON?

La konklavo, dum kiu oni elektos la 267-an posteulon de Sankta Petro, estos la tria en la 21-a jarcento. La unua konklavo okazis en 2005 post la morto de Johano Paŭlo la 2-a kaj daŭris du tagojn (18-a kaj 19-a de aprilo). Papo Benedikto la 16-a estis elektita en la kvara balotado. En 2013, la 12-an kaj 13-an de marto, sekvis konklavo post la rezigno de Benedikto la 16-a. Papo Francisko estis elektita en la kvina balotado.

La nova konklavo komenciĝos per la Meso por la Elekto de la Papo. Tiu Meso estos celebrata je la 10-a horo la 7-an de majo 2025 en la Baziliko de Sankta Petro, sub prezido de la doajeno de la Kardinala Kolegio, Giovanni Battista Re. La Meso estos malfermita por ĉiuj fideluloj.

Posttagmeze, je la 16.30 horo, la kardinaloj-elektantoj procesie eniros la Sikstan Kapelon kantante la himnon *Veni Creator Spiritus*. Tie ili solene ĵuros pri sekreteco. La mediton prezentos kardinalo Raniero Cantalamessa, emerita predikanto de la Papa Domo. Poste okazas la solena momento kiam la ceremoniestro de la papaj liturgiaj celebradoj anoncas: *Extra omnes!* (Ĉiuj eksteren!). Tiam ĉiuj krom la kardinaloj-elektantoj devas forlasi la kapelon. Tiel la konklavo oficiale komenciĝas.

La sekreta karaktero de la elekto celas konservi la integrecon de la procezo, malhelpi eksterajn influojn kaj favori etoson de preĝo kaj prudento. La balotadon precize difinas la Apostola Konstitucio *Universi Dominici Gregis*. Ĝi postulas, ke la konklavo okazu en la teritorio de Vatikano, en taŭge preparitaj kaj fermitaj ejoj. Kardinaloj-elektantoj estos loĝigitaj en la Domo Sankta Marta (n-ro 42), dum la Siksta Kapelo kaj aliaj liturgiaj lokoj estos sub la kontrolo de la Kardinalo Kamerlengo (n-ro 43). Ekde la komenco de la konklavo, kardinaloj-elektantoj devas deteni sin de skriba korespondado, telefonado kaj aliaj formoj de kontakto kun la ekstera mondo (n-ro 44). Eĉ tiuj kiuj pro oficaj kialoj troviĝas en Vatikano ne rajtas konversacii kun ili (n-ro 45). Por praktika subteno estos disponeblaj la sekretario de la Kardinala Kolegio, estro de la Papaj Liturgiaj Celebroj kun helpantoj, kelkaj konfesprenantoj kaj du kuracistoj (n-ro 46). Ĉiuj ili devos ĵuri pri absoluta sekreteco, kies rompo kondukas al ekskomuniko *latae sententiae*, rezervita al la Apostola Seĝo.

Por valida elekto de Papo necesas dutriona plimulto de la ĉeestantaj kardinaloj-elektantoj. En la nuna konklavo ĉeestos 133 elektantoj; do por valideco necesas 89 voĉoj.

La 7-an de majo estos nur unu balotado. Dum postaj tagoj okazos kvar balotadoj - du matene kaj du vespere. Se post tri tagoj ne okazas elekto, oni faros tagon de paŭzo por pripensado. Post la 33-a aŭ 34-a baloto, tio estas post naŭ tagoj, oni limigos la elekton inter la du kardinaloj kiuj ricevis la plej multajn voĉojn en la lasta voĉdono, sen ke ili rajtu baloti. Tamen ankaŭ tiam necesas dutriona, ne simpla plimulto.

Dum antaŭbalota fazo oni lotas tri voĉnombrantojn, tri kolektantojn de la voĉoj de malsanuloj kaj tri kontrolantojn.

Sur la balotilo, sub la latina surskribo *Eligo in Summum Pontificem*, la elektanto skribas la nomon de sia kandidato, per laŭeble nerekonebla manskribo. La balotilo estas faldita kaj enmetita en specialan ujon. Ĉiu kardinalo laŭ ordo aliras la altaron, montrante la balotilon, kaj metante ĝin en la ujon prononcas: **“***Mi vokas Kriston la Sinjoron kiel ateston, kiu min juĝos, ke mi donis mian voĉon al tiu, pri kiu mi, laŭ Dia volo, kredas ke li devas esti elektita.***”**

Post la enmeto de ĉiuj balotiloj, la unua voĉnombranto miksas ilin, kaj poste ili estas transdonataj unu post la alia al la dua kaj tria voĉnombrantoj. La tria voĉe legas ĉiun nomon, dum ĉiuj kardinaloj notadas la voĉojn. La lasta voĉnombranto traboras ĉiun balotilon per fadeno tra la vortoj *Eligo in Summum Pontificem*, por pli sekura konservado. Fine la fadeno estas nodita kaj la balotiloj konservataj.

Sekvas la postbalota fazo: oni kalkulas la voĉojn. Se neniu ricevas dutrionan plimulton, ne estas elektito. Se iu atingas tiun nombron, la elekto estas kanone valida. La kontrolantoj tiam komparas la rezultojn kun la notoj de la voĉnombrantoj. Antaŭ ol la kardinaloj forlasas la kapelon, ĉiuj balotiloj kaj eventualaj notoj estas bruligitaj por garantii sekretecon. Poste, la kardinalo kamerlengo redaktas raporton, kiun kunsubskribas tri kardinaloj-asistantoj. La dokumento estas transdonita al la papo kaj konservata en la arkivo.

Se post unua baloto sekvas dua en la sama tago, oni bruligas la balotilojn kune. Tial, se neniu estas elektita dum kvar balotadoj en unu tago, nigra fumo eliras el la kamentubo de la Siksta Kapelo dufoje: ĉirkaŭ la 12-a kaj 19-a horoj. Se papo estas elektita jam en la unua balotado, la blanka fumo aperas pli frue.

La kardinalo kiu estas elektita, devas akcepti la elekton kaj elekti la papan nomon. Post kiam la Papo estas elektita, dum la blanka fumo leviĝas el la kamentubo de la Siksta Kapelo, oni aŭdas la sonorilojn de la Baziliko de Sankta Petro.

La plej aĝa kardinalo-diakono - nomata la kardinalo protodiakono de la centra loĝio de la
Baziliko de Sankta Petro – anoncas en la latina lingvo:
*Annuntio vobis gaudium magnum: Habemus Papam!*
(Mi anoncas al vi grandan ĝojon: Ni havas Papon!)
Kaj prononcas la nomon de la Papo kun la mencio de la nomo kiun li elektis.

Por la unua apero de la novelektita Papo estis preparitaj blankaj sutanoj en tri grandecoj. La novelektita Papo aperas ĉe la centra loĝio de la Baziliko de Sankta Petro, de kie li donas la benon *Urbi et Orbi* - al la urbo (Romo) kaj al la mondo.

Kompilis: Marija Belošević